

Duonvokaloj kaj diftongoj

Studaĵo de *Sergio Pokrovskij*

Versio unua: 2012-11-17

Versio ĵusa: 2013-07-15

La studaĵo temas pri la fonetika kaj fonologia valoroj de la parolsonoj signataj per la literoj *j* kaj *ĵ* en Esperanto.

(Ĉi tiu teksto estas kompostita por oportuna legado sur 6-cola ekrano kun la formato 3:4, t.e. 9×12 cm, kian havas multaj nuntempaj bitlibrolegiloj.)

Enhavtabelo

Duonvokaloj kaj diftongoj.....	1
La problemo.....	3
Priskribo fonetika.....	4
La alofonoj de la fonemo /j/.....	6
Atesto Kaloĉaja.....	9
La litero ŭ.....	11
En la Fundamentaj gramatikoj nacilingvaj (La sekcio A):.....	13
En la ceteraj partoj de la Fundamento.....	16
Posta leksiko.....	17
La Lingva Respondo de Zamenhofo pri la duonvokaloj.....	18
Kelkaj klarigoj pri la respondo.....	21
Dek ok jarojn poste.....	23
Esperanto kaj la funkcia fonetiko.....	27
La teorio.....	28
Fonetiko kaj fonologio.....	29

La koloroj.....	30
Kiel difini la fonemaron.....	32
La rusa [ŭo].....	33
«Leksike ne atestitaj» kaj «Fonetike maleblaj».	34
Pri kontraŭekzemploj liternoma kaj sonimita...	35
Kio estas diftongo.....	39
La dilemo.....	44
Se Ŭ estus samspeca kiel J (la emancipo de Ŭ)	45
Koherigo de la tradicia sistemo diftonga.....	48
La varianto ĉeĥa-hungara.....	49
Uzi ligaĵojn.....	52
Uzi super- aŭ subsignon.....	53
Nelatina alfabeto.....	53
[w] kiel alofono de /v/.....	55
Konkludo.....	56

La problemo

Praktika demando, kiu instigis min verki ĉi tiun studaĵon, estas la problemo pri kombineblo de la litero (aŭ «parolsono») ŭ, kaj la eblo uzi ĝin por

transskribi la fremdan konsonanton [w]; ekzemple, ĉu konvenas transskribi la fremdajn vortojn *Washington*, *Nikaragua*, *Okinawa* per *Ŭoŝington*, *Nikaragŭo*, *Okinaŭo*? En la tradicia Esperanto tiaj uzoj estas malaprobataj¹. Kiel eblas klarigi tian malaprobobon?

Priskribo fonetika

Komunlingve oni karakterizas la sonojn prezentatajn per la literoj *ŭ* kaj *j* kiel *duonvokalojn*. En la moderna terminaro fonetika tiu termino iel eksmodiĝis; ĉiel ajn gravas, ke fonetike oni povas atribui al tiuj literoj po du parolsonojn:

1 «Iuj volas uzi Ŭ en ĉiaj pozicioj. Ili kreas vortojn, kiuj havas komencan aŭ postkonsonantan Ŭ: *Gŭatemalo*, *ŭato*, *ŭesto* k.s. Tiaj vortoj estas eraraj, oni uzu *Gvatemalo*, *vato* kaj *okcidento*» [PMEG].

- la konsonantojn [w] kaj [j]; kaj
- la duonvokalojn [ŭ] kaj [ĵ]

(tio ne estas tre moderna terminaro, sed mi ĝin preferas kaj uzos en ĉi tiu studaĵo; krome, mi uzos supersignajn bovlojn por transskribi la duonvokalojn anstataŭ la IFA-e pli tradiciajn subsignojn ĉe $\underset{\cdot}{u}$ kaj $\underset{\cdot}{j}$, kiuj malpli ofte disponeblas en la ordinaraĵaj tiparoj).

Evidente inter diversaj lingvanoj ekzistas variado pri la fakta uzo de tiuj 4 sonoj por realigi tiujn $\underset{\cdot}{u}$ kaj $\underset{\cdot}{j}$. Por iel aranĝi la prezenton de la materialo, mi precipe priskribos mian personan uzadon (kia mi ĝin imagas). Tio ne signifas ke mi opinias ĝin la sola ĝusta; tamen tio estos ia komenco kiu cetere ebligos ankaŭ aliajn variantojn priskribi per diferencoj kaj similaĵoj.

La alofonoj de la fonemo /j/

En mia idiolekto (samkiel ĉe multaj aliaj esperantistoj rusdevenaj) la fonemo /j/ realiĝas per ambaŭ alofonoj supre menciitaj:

- Per la konsonanto [j] antaŭ- kaj intervokale: *krajono* [kra.jo.no].
- Per la duonvokalo [j̥] silabofine: *kaj* [kaĵ], *tuj* [tuĵ], *fojno* [foĵ.no].

Probable tia malsimetrio estas afero sufiĉe komuna; almenaŭ fonologie estas tia malsimetrio eĉ en la anglaj transskriboj *yes* /jes/ kaj *say* /seĵ/.

Menciindas, ke la intervokala *j* kondutas en Esperanto ne kiel en la angla (kie ĝi ofte formas diftongon kun la antaŭa vokalo), sed kiel konsonanto laŭ la modelo rusa. La «Ekzercoj de legado» en la Fundamenta Ekzercaro demonstras tion per la silabado de la intervokalaj *j*:

Kra-jó-no. Ma-jés-ta. ... Má-jo. [§2]

(dum inter vokalo kaj konsonanto *j* aliĝas al la vokalo: «Prúj-no. Véj-no» [§2]; «Fój-no» [§3]). Male, en la angla, laŭ [atesto](#) de *J. Wells*, fremdlingva /j/ eĉ intervokale ofte kunfandiĝas kun la antaŭa vokalo formante diftongon:

- *Toyota* ['to.jo.ta] angliĝas kiel [tɔɪ'əʊtə].
- *Sayonara* [sa.jo:.na.'ra] iĝas [sai.ə'na:.rə].
- La hispana *playa* ['pla.ja] iĝas ['plai.ə], kaj *papaya* [pa'pa.ja] iĝas [pə'pai.ə].
- La franca *Bayeux* [ba.jø] kutime iĝas [baɪ'z:] aŭ ['baɪ.z:].

(la ekzemploj estas transskribitaj brite, sed mi supozas ke ankaŭ usonangle la silabado estas simila).

Laŭ mia (ne kompetenta) opinio mia sono [j] – aŭ eĉ pli frota [j̥] – estas normala konsonanto, malsama ol la duonvokalo [j̥]:

1. Se mi frustras *jida*, tio sonas proksimume kiel [çita], kaj [ç] (la norma *Ich-Laut*) ja estas eksterduba konsonanto.
2. Mi povas tiri *jjjj* samkiel mi povas tiri *jjjj̃* aŭ *sssss* aŭ *ŝŝŝŝ* (probable tio maleblas por ĵ, ĉu? Cetere, mi aŭdadis hezitan anglalingvan y-yes.).
3. La silabado sekvas la konsonantan modelon: *pro-jekto*, *lo-jala*, *ma-jusklo*, *ma-joro*. Malpli evidentas la silabado de *ĝojigi*, kiun mi persone en senĝena interparolo emus prononci *ĝo-ji-gi*.
4. La ĉeĥaj *jsem*, *jsou* (kontraste al la nega *nejsem*).

Mi koncedas, ke pro simpleco ni havas intereson unuigi la alofonojn; nu, se simpligi, tiam mi rekomendus elekti ĝuste la konsonanton [j], kiu estas pli kontrasta, kaj ebligas realigi ĉiujn kombinojn, interalie *ji* kaj *ij* – kiel en la francaj vortoj

taille [taj] (prefere ol en la angla *tie* [taĭ]), *fille* [fij], *soleil* [sɔləj], *grenouille* [grənuj] ktp.

Mi opinias ke unuecigo surbaze de [ĭ] estus malpli taŭga. Mi ne certas, kiel oni prononcus *jida*, *Jiftaĥ* aŭ *Ijob* kun [ĭ]; kaj [ʼĭama] lasas min perpleksa, ĉu oni celas *jama* aŭ *iama*.

Aliflanke, mi neniam spertis problemon pri mia du-alofona realigo de /j/.

Atesto Kaloĉaja

Ĝis nun mi parolis pri mia propra prononco; por kompletigo mi aldonu ateston de *K. Kalocsay* el la klarigaj notoj pri lia traduko de «Infero»². Mi tuj diru, ke mi opinias la de li prezentatan licencon malakceptebla, ke ĝi povas funkcii nur en la frota realigo de /j/.

2 *Dante* tr. *K. Kalocsay*: *Infero*. Literatura Foiro, 1979.
P. 274.

esperantistoj; tamen mi ĝin citas kiel ateston pri tio, ke la frota [j] ne estas io eksterordinara en Esperantujo, ke ankaŭ alilingvaj esperantistoj ĝin uzas (kaj eĉ misuzas; mi forte malkonsentas, ke oni rajtus ĝin profiti por foneme distingi inter [j] kaj [ĵ] kaj [ĵ] kaj uzi tiun lastan kiel alofonon de /i/):

Krome mi uzis t.n. *sensilabigon* de la neakcentitaj *i* kaj *u* apud alia vokalo. Ilia uzo jam havas certan tradicion en Esperanto (Bennemann, Minor, mi mem) kaj mi vere ne vidas seriozan kaŭzon ekstermi ĉi tiun licencon. Ĝi ne signifas, ke anstataŭ *i* oni prononcu *j*, sed ĝi elprofitas nur tion, ke ĉi tiujn du «glitajn» vokalojn apud alia vokalo oni povas senpene elparoli tiel, ke la kuna daŭro de du vokaloj egalu la daŭron de unu silabo. Kompreneble, en Esperanto oni ne povas uzi la hiatojn tiel, kiel laŭ la itala prozodio, kie ekzemple 11 silabojn oni kalkulas el la sekvantaj 17 silaboj:

Con gli altri, innanazi agli altri apri la canna ...

ĉar tio estigus neelteneblajn akcentkarambolojn, sed mi kredas, ke en la versoj:

ni venis lokon, kie orkestro tuta ...

aŭ:

kiel se de l' kristana iu ekfridas ...

estas tute facile doni al la 3 vokaloj i-e-o la daŭron de 2, kaj al la 4 vokaloj a-i-u-e la daŭron de 3 silaboj. Simile nenio malhelpas en la sekvanta verso:

Jozefon unu akuzis kalumnie ...

elparoli proksimume: unŭ akuzis ...

La litero ŭ

La gramatikistoj, komencante per Zamenhofo mem, traktas *j* kaj *ŭ* kiel fenomenojn samspecajn, kaj la ecojn de *j* senpripense atribuas al *ŭ*. Tio estas evidente erara: ekz-e neniam estis dubo, ĉu eblas uzi *j* en la komenco de silabo, dum por *ŭ* tio restas

afero akre diskutata. La intervokalaj aperoj de *j* estas abunde atestitaj ene de radikoj, dum nekontestataj similaj aperoj de *ŭ* okazas nur ĉe morfemaj limoj (*naŭa* ktp).

Probable Zamenhofo (kaj plimulto da esperantistoj) ne konsciis pri diferencoj inter la konsonantoj (kia [w]) kaj duonvokaloj (kia [ŭ]); tial, kvankam ordinare Zamenhofo traktis *ŭ* kiel glitantan kromparton de diftongoj, tamen en tri okazoj li cedis al la supraĵa logiko – ekz-e por formi la liternomon *ŭo* sammaniere kiel la aliajn liternomojn nevokalajn.

Ni ekzameni la prezenton de la koncerna materialo ĉe Zamenhofo.

En la Fundamentaj gramatikoj nacilingvaj (La sekcio A):

Ruse:

буква *й* (которая употребляется только послѣ гласной), произносится какъ короткое *и* въ нѣмецкомъ словѣ *kaufen* или въ латинскомъ *laudo*. – Т.е. (traduko mia) «la litero *й* (uzata nur post vokalo), estas prononcata kiel la mallonga *и* en la germana vorto *kaufen* аŭ en la latina *laudo*.»

Germane:

u — wie das kurze *u* in *glauben* (wird nur nach einem Vokal gebraucht). – Т.е. «*u* [preseraro, temas pri *й*] – kiel la mallonga *u* en *glauben* (uzata nur post vokalo) »

Angle:

Ŭŭ, u as in „mount“ (used in diphthongs) – T.e. « Ŭŭ, kiel *u* en „mount“ (uzata en diftongoj) »

France:

Ŭŭ, ou bref (dans l’allemand „laut“) – T.e. « Ŭŭ, *u* mallonga (en la germana „laut“) »

Pole:

Ŭŭ, u (krótkie) – T.e. « Ŭŭ *u* (mallonga) »

La tekstoj atestas, ke evidenta ĉefmodelo por Zamenhofo estis la germana diftongo *au*, per kiu li klarigas la signifon de *ŭ* al la parolantoj de la lingvoj kie *ŭ* malestas (t.e. al la rusoj kaj al la francoj):

- la rusa lingvo havas nenion similan; Zamenhofo do klarigas per la germana;
- la franca posedas la konsonanton [w] (ekz-e *oiseau* [wa'zo], *Ouest* [west], *ouïe* [wi]) – sed Zamenhofo ne trovis konvena uzi ĝin en klarigo, kaj ankaŭ la francojn li sendas al alilingva ekzemplo (iuj fonetikistoj tamen vidas en la koncernaj francaj vortoj diftongojn – tamen alispecajn ol la esperantajn: ne malkreskajn, kiel *aŭ*, sed kreskajn: de la glitanto *ŭ* al plenvokala kerno; tia interpreto liverus argumenton kontraŭ la kreskaj diftongoj de la tipo [ŭa] en la normala Esperanto);
- la angla posedas kaj la konsonanton [w], kaj diftongojn kun *ŭ* – tial Zamenhofo indikas la diftongon *aŭ* el *mount*, kaj ne mencias la konsonanton;

- la pola lingvo klerula ja posedas la diftongojn *aŭ* kaj *eŭ* en la pruntvorotoj kiel *autor* aŭ *Europa*, do ĝuste tiajn, kiajn Zamenhofo intencis doni al Esperanto; tio estis afero konscie lernata (malsimile ol por la germanoj aŭ angloj), tial li ne bezonis aparte klarigi tion al la poloj (krome, en la moderna pola lingvo la sonvaloro de *t* ŝanĝiĝis en [w], sed en la zamenhofa epoko tiu duonvokaligo – pole *walczenie* – oficiale ne ekzistis; ĝi ankoraŭ estis rigardata kiel subnorma plebaĵo kaj iĝis norma nur en la mezo de la 20^a jc).

En la ceteraj partoj de la Fundamento

En la Fundamenta Ekzercaro

Malgraŭ la avertoj de la gramatiketoj rusa kaj germana, en §1 aperas la literonomo *ŭo*.

(Ĉiuj ceteraj aperoj de *ŭ*, 149 entute, estas en la kombino *aŭ*, plus *Eŭropo* en la ekzerco pri legado.)

En la Antaŭparolo

Nur ene de *aŭ* (40 aperoj).

En la Universala vortaro

68 aperoj en *aŭ* + *leŭtenanto*.

Posta leksiko

Poste Zamenhofo dufoje uzis antaŭvokalan *ŭ* (en sonimitoj):

- Ĉiam la bubeto krias: ŭa! ŭa! ŭa!
[Revizoro, 5:5] (originale: Всѣ будет мальчишка кричать: ya! ya! ya!)
- «Kŭaks, kŭaks, brekekekeks!» estis ĉio, kion li povis diri (la *Fabeloj*, «Elinjo-fingreto»); «li» estas bufido)

Tiu sonimito *kŭaks* estas hapakso; en la aliaj fabeloj Zamenhofo uzas la regulan sonimiton *kvak!* kaj la verbon *kvaki* :

- «Kvak! Estas malseke!» [*Malgranda Tuk*]
- ... tio estis ranoj, kiuj kvakis en la marĉoj [*Anneto*]

Malprobablas ke per uzo de *kŭaks* Zamenhofo volis distingi inter la blekoj ranaj kaj bufaj.

La unika *poŭpo* (kaj ĝia rivalo *pobo*) ne estas tiom marĝena kiel *ŭesto* kaj *ŭato*.

La Lingva Respondo de Zamenhofo pri la duonvokaloj

Ĉi-sube estas citita la «lingva respondo» fare de Zamenhofo, aperinta en *Esperantisto* (1893, p. 15), kaj numerita kiel la 70^a en la Varingjena eldono:

Pri la literoj U kaj Ŭ, I kaj J. Kelkaj amikoj ne bone komprenas kaj ne regule uzas la literojn *u*, *ŭ*, *i* kaj *j*. Laŭ ilia opinio (esprimita eĉ en kelkaj lernolibroj) la literoj *u* kaj *i* kune kun antaŭirantaj vokaloj faras «duoblan vokalon»; ili sekve elparolas *au* kiel *aŭ*, *ei* kiel *ej* k.t.p. Tio ĉi estas eraro. En nia lingvo ne ekzistas duoblaj vokaloj, sed ĉiu litero estas elparolata ĉiam egale kaj ĉiam aparte. Sekve oni devas legi *ba-lá-u*, *pra-ú-lo*, *tro-ú-zi*, *de-í-ri*, *kré-i*, *hero-í-no* kaj ne *bá-laŭ*, *práŭ-lo*, *tróŭ-zi*, *déj-ri*, *krej*, *herój-no* (kiel faras multaj germanoj, havantaj tiun ĉi kutimon en sia lingvo). La literoj *u* kaj *i* devas ĉiam esti elparolataj klare kaj aparte, kiel ĉiu alia litero.

Sed ekster *u* kaj *i* en nia lingvo ekzistas ankoraŭ la literoj *ŭ* kaj *j*, kies elparolado estas simila al la elparolado de *u* kaj *i*, sed pli mallonga kaj ne prezentanta silabon (kiel konsonanto); se ili staras post vokalo, ili estas elparolataj kun ĝi en unu silabo kaj tial faras impreson de duobla vokalo. La literoj *ŭ* kaj *j* ĉiam ankoraŭ estas elparolataj aparte, sed ili ĉiam estas konsonantoj, tute egale, ĉu ili staras antaŭ vokalo aŭ post vokalo. Sekve oni devas legi *ja-ro*, *jus-ta*, *kra-jo-no*, *fraŭ-lo*, *Eŭ-ro-po*, *foj-no*, *paj-lo* kaj ne *i-a-ro*, *i-us-ta*, *kra-i-o-no*, *fra-u-lo*, *E-u-ro-po*, *fo-i-no*, *pa-i-lo*. Se ni la germanajn vortojn *Saite*, *Traube* volus skribi per ortografio Esperanta, ni devus skribi *Zajte*, *Traŭbe*. La vorto *laŭta* ekzemple estas

dusilaba kaj ne trisilaba, sed ne pro la kaŭzo ke *aŭ* estas kvazaŭ duobla vokalo, sed nur ĉar *ŭ* estas konsonanto (dum *u* estas vokalo).

Kelkaj klarigoj pri la respondo

La Zamenhofa esprimo «duobla vokalo», uzita en ĉi tiu respondo, estas paŭsaĵo de la greka δίφθογγος, laŭvorte «dusona» aŭ «dutona»; en la moderna lingvo oni sentraduke transskribas tion: *diftongo* (termino oficiala ekde la 1^a OA).

Sekve de tiu interpreto de la ĉi-supre lingva respondo multaj esperantistoj (kaj inter ili PIV) asertas, ke en Esperanto diftongoj ne ekzistas.

Tamen eblas, ke ĉi tie estas miskompreno. Eble Zamenhofo ĉi tie imitis la misuzon de la fone ŝvebanta termino *Diphthong*, komunan al kelkaj lingvoj okcidentaj: samkiel ili konfuzas fonetikajn akcent-

ojn kun skribaj supersignoj (*accent aigu* ktp), tiel same ili konfuzas fonetikajn diftongojn kun skribaj duliteraĵoj el du literoj, ĉiu el kiuj normale reprezentas plenan vokalon, kiuj tamen kune reprezentas fonetikan diftongon; ekz-e laŭ la angla vortaro de *Collins*,

diphthong *n*

1. a vowel sound, occupying a single syllable (...)
2. a digraph or ligature representing a composite vowel such as this, as *ae* in *Caesar*.

Ne pri la fonetikaj diftongoj temas ĉi tiu respondo. La ĉeftemo estas averto kontraŭ eraro de iuj esperantistoj, kies hejmlingva **skribosistemo** trudas pozician mislegon *i*→/j/ (kiel la franca *pie* /pje/, kp la esperantan /pi'edo/) aŭ *au*→/aŭ/ (kiel la

misdiftongigo *Saud*→/saŭd/, malgraŭ la origine akcenta kaj longa /u:/ en la araba nomo). Zamenhofo indikas, ke en Esperanto ĉiu duonvokalo havas apartan literon, kiu sola povas ĝin reprezenti en la skribo.

En tia interpreto ĉio estas tute ĝusta (kaj tute mem-evidenta kaj absolute senutila por ekz-e la rusoj, kies skribosistemo neniam konfuzas и /i/ kaj ѥ /j/).

Mi koncedas, ke tiun skribisman interpreton de «duobla vokalo» malfacilas apliki al la lasta parto de la Respondo, kie Zamenhofo negas la diftongecon en *laŭdo*. Eble la verbo forportis lin tro malproksimen. Nu, ni komparu tiun Respondon kun Respondo konsiderinde pli malfrua.

Dek ok jarojn poste

La rigorisman respondon pri la diftongoj endas kompari kun iom tro liberala lingva respondo ali-

tema, publikigita 18 jarojn pli malfrue:

Pri elparolado en teorio kaj en praktiko. Kiel en ĉiuj lingvoj, tiel ankaŭ en Esperanto la sono *j* ordinare moligas la konsonanton, kiu staras antaŭ ĝi; oni sekve ne devas miri, ke ekzemple en la vorto «panjo» la plimulto de la Esperantistoj elparolas la *nj* kiel unu molan sonon (simile al la franca *gn*). Tiel same oni ne miru, ke en praktiko oni ordinare antaŭ *g* aŭ *k* elparolas la sonon *n* naze, aŭ ke antaŭ vokalo oni elparolas la *i* ordinare kiel *ij*. Batali kontraŭ tia natura emo en la elparolado ŝajnas al mi afero tute sencela kaj senbezona, ĉar tia elparolado (kiu estas iom pli eleganta, ol la elparolado pure teoria) donas nenian malkompreniĝon aŭ praktikan maloportunaĵon; sed

rekomendi tian elparoladon (aŭ nomi ĝin «la sole ĝusta») ni ankaŭ ne devas, ĉar laŭ la teoria vidpunkto (kiu en Esperanto ofte povas esti ne severe observata, sed neniam povas esti rigardata kiel «erara») ni devas elparoli ĉiun sonon severe aparte; sekve se ni deziras paroli severe regule, ni devas elparoli «pan-jo», «san-go», «mi-a». (Respondo 56^a, Oficiala Gazeto, IV, 1911, p. 222.)

Se Zamenhofo estus dirinta, ke la molaj konsonantoj sekvataj de *j* estas alofonoj de la malmola ĉef-formo, t.e. ke

- /panjo/ estas realigebla per [pañjo], aŭ
- /sinjoro/ estas realigebla per [siɲoro], aŭ
- /inko/ estas realigebla per [iŋko] ktp –

tio estus tute bona kaj konforma al la moderna lingvostato. Tamen ĉi-okaze la vervo forportas Zamenhofon al la alia ekstremo, kaj li (se mi bone komprenas ĉi tiun respondon) pretas toleri multe pli seriozajn rompojn de la laŭfonema skribosistemo ol la naivaj diftongoj, kies ekziston iuj negas surbaze de la pli frua respondo: li ŝajnas permesi uzon de simplaj [paño], [sijoro], [saño], en kiuj koncernaj kromsonoj ne plu interpreteblas kiel poziciaj alofonoj de /n/ (en la pozicio antaŭ /j/); ilin do endus trakti aŭ kiel /pano, sinoro, sano/; aŭ kiel apartajn fonemojn.

Estas tre stranga toleri la misprononcon [saño] – kaj samtempe malpermesi la diftongan prononcon de *laŭdo*. Por mi la angla *now* (precipe en ĝia britia versio) sonas kiel tute bona realigo de *naŭ*. Kaj *mount* estas prezentita en la Fundamento kiel modelo pri ŭ.

Zamenhofo estis homo de sia tempo, kaj la konceptoj de la funkcia fonetiko, la nocioj *fonemo* kaj *alofono* estis al li nekonataj. Tamen kurioze, ili naskiĝis tute apude en la spaco kaj tempo.

Esperanto kaj la funkcia fonetiko

Esperanto (unue publikigita en Varsovio en la 1887^a jaro) kaj la konceptoj «fonemo», «funkcia fonetiko» (unue aperintaj en Varsovia publikaĵo de la 1881^a jaro³) estiĝis apude kaj evoluis paralele. Eĉ pli ol tio, Bodueno (Иван Александрович Бодуэн де Куртенэ, Jan Niecisław BAUDOIN DE COURTENAY) persone vizitis Zamenhofon en

3 И.А. Бодуэн де Куртенэ: Некоторые отделы «сравнительной грамматики» славянских языков. – Русский филологический вестник. Varsovio, 1881. Vol. 5. («Endas divergentojn [= alofonojn] ĝeneraligi en fonemojn». – Панов, 111)

Varsovio, kaj ĉiam subtenis Esperanton, interalie ĉe la Delegacio.

Tiuj homoj, socie tiom malproksimaj⁴ bone komprenis kaj estimis unu la alian. Tamen la fonetikaj ideoj de Bodueno evidente restis nekonataj al Zamenhofo – kaj la eŭropa scienco konatiĝis kun ili jardekojn poste, per la Praga lingvosciencas skolo, kien elmigris kelkaj disĉiploj de Bodueno.

La teorio

Mi pardonpetas pri tiu prezento de konataĵoj, tamen en la diskutoj pri diftongoj kaj similaj aferoj

⁴ Post la Revolucio, respondante demandaron en la Petrograda universitato, la demandon pri la «socia deveno» Bodueno respondis per «de la imperiestroj Bizanciaj». Tamen li ne longe tiel provokis la novan reĝimon, kaj en la jaro 1818^a revenis Varsovion.

mi konstante vidas saltadon de unu nivelo en alian, konfuzon de aferoj fonologiaj kaj akustikaj ktp. Tial mi almenaŭ menciuj la neceson distingi tiujn nivelojn.

Fonetiko kaj fonologio

La fizikaj, krudaj parolsonoĵ, formas malfinian kontinuumon. Tiajn sonojn eblas studi objektivaj, per artikulacio (anatomie); akustike; mezuri per instrumentoj ktp. Tion mi nomus «fizika fonetiko».

Tamen en la reala lingvistudo oni kutime reduktas tiun kontinuumon al iu finia sistemo da fonemoj; ekz-e estas 34 fonemoj en la rusa lingvo. Estas kiel ciferecigo de analoga teksto, voĉe legita aŭ mane skribita. Tiam sistemon studas «funkcia fonetiko» aŭ «fonologio».

La transskribojn de fizika fonetiko oni pakas en rektajn krampojn: [ĭ], [j]. La transskribojn de la

funkcia fonetiko laŭ la difino de la Praga skolo oni pakas per oblikvoj: /i/, /j/. Paralele kaj sendepende kun la Praga skolo evoluis ankaŭ aliaj difinoj de fonemo, ekz-e en la Moskva skolo (egale bazita sur la verkoj de Bodueno) – la fonologiajn transskribojn de la Moskva skolo oni metas inter krampojn angulajn: ⟨i⟩ ktp.

Diversaj lingvoj malsame strukturadas la realon. Ne temas pri fiziologiaj apartaĵoj, temas pri tradicio kaj sistemo. Konsideru kiel ekzemplan analogion alian kontinuan, la spektrokolorojn.

La koloroj

Laŭ la tradicio, ŝuldata al Neŭtono, oni kutimas nombri 7 kolorojn en la spektro (nombro arbitra, inspirita de la 7 notoj en muziko); tamen ne ĉiam oni listigas la samajn kolorojn.

La lastaj 4 koloroj en la neŭtona listo estas

- verda
blua
indiga
viola

Por la rusaj lernejoj ili estas

- verda
- ĉiela (голубой, la blua-verdaj koloroj)
blua
viola (la blua-ruĝaj koloroj)

Kiam mi montris al mia edzino indigan pecon, ŝi senhezite nomis ĝin «viola». Dum la koloroj cejana kaj lazura estas por ruslingvano specoj de «голубой».

Kiel difini la fonemaron

Unu el la reguloj kiujn oni aplikas difinante sonsistemon estas jena⁵:

Elemento, kiu ĉiam aperas kiel akompananto de alia elemento, ne estas aparta signo. Se estas A kaj U, kaj U ĉiam aperas post A, tiam U ne estas aparta signo. Ĉe tio, se A povas aperi sen U, tiam A en tiaj okazoj estas aparta signo; dum U, ĉar ĝi ĉiam aperas kun A, estas nur ties «ombro». Alivorte, tiam ni havas du signojn, A kaj AJ, kie AJ estas unu integra, neanalizinda tuto.

5 Панов М.В.: *Фонетика*. М.: Высшая школа, 1979. С. 10–11.

La rusa [ŭo]

La validecon de la ĉi-supra regulo (almenaŭ por la ruslingvanoj) bone ilustras la rusa fonemo /o/, kiu fonologie estas diftongo (aŭ «diftongojdo») [ŭo]. Ordinara ruslingvano ne kredas tion kaj ne perceptas tiun [ŭ]: sekve de la indikita regulo la kombinon [ŭo] *la rusoj* perceptas kiel simplan fonemon. Sed alilingvanoj (ekz-e la francoj) klare perceptas diftongon. Por pruvi la diftongecon de la rusa /o/ al ruslingvano necesas registri vorton kiu ĝin entenas, kaj aŭdigi ĝin retrodirekte (inversigite). Tiam [ŭo] iĝos [oŭ], kaj ĉar tia sonkombino ne estas rusa fonemo, la rusoj bone aŭdos la diftongon. Tiel mi registris la rusan ekkcion «OH, OH!» (/on, on/ – t.e. emfaza «Li, (estas) li!») – al kiu mi algluis ĝian komputile faritan inversigon (mi ankaŭ malrapidigis la registraĵon je 30% por pli bone evidentigi la diftongon). Rezultas ([alklaku por aŭskulti!](#)) [ŭon, ŭon – noŭ, noŭ].

«Leksike ne atestitaj» kaj «Fonetike maleblaj»

Oni ne tabuu iujn sonkombinojn nur tial, ke ili malestas en la jam establita leksiko. Tion mi ilustru per ekzemplo el la fonetiko rusa: abstrakte parolante, eblas fari liston el 19 kombinoj «ц (= c = /ts/) + konsonanto» artikulacie senproblemaj kaj koheraj kun la fonemaro: *цк, цл, цн, ... цф, цх*. La rusa leksiko tamen reale uzas nur 7 el ili. Sed oni facile (sen ia ajn aparta trejnado) prononcas kaj ĝuste perceptas la nereprezentitajn kombinojn el la 19-era listo en fremdaj vortoj: *Цфасман* (Cfasman), *Цхалтубо* (Cĥaltubo).

Se anstataŭe konsideri iun maleblan kombinon, ekz-e *цщ* en imagitaj vortoj *Цщокке, цщоккист*, tiam per speciala streĉo de la artikulado oni eble povus ĝin prononci; tamen ordinara aŭskultanto en tia kombino ignorus la komencan *ц*, kaj se la deriv-

aĵon la lingvo asimilus, ĝi ricevus la sonformon egalan al tiu de (egale imagita) *щекист*.

Kompreneble oni konsideru la realajn parolsonojn, ne la ortografiajn fantomojn. La vortoj kiel «абстрактный» (abstrakta) aŭ «абсурдный» (absurda) neniel atestas, ke la malfacilega sonkombino [bs] estas fonetike reprezentita en la rusa. Reale tiuj vortoj entenas la laŭsisteman [ps], kaj la ortografio ne respondas al la realo.

Pri kontraŭekzemploj liternoma kaj sonimita

Jen iom simila situacio en la rusa fonetiko, kiam ĝeneralan aserton kontraŭas liternomo kaj sonimito⁶.

⁶ ПАНОВ М.В.: *Фонетика*. М.: Высшая школа, 1979. С. 152.

En la rusa lingvo la parolsono [i], signata per la litero *и*, estas pozicia alofono de la fonemo ⟨i⟩. Nome, ĝi realigas la fonemon en la pozicio post malmola konsonanto ene de sintagmo:

нить – нить t.e. [níť] – [nít'] t.e. ⟨níť⟩ – ⟨nit'⟩
играть → сыграть, отыграть, подыграть⁷ ...
искра → от [ы]скр (ortografie «от искр») ...

⁷ Tia ŝanĝo tute regule okazas ankaŭ en pruntitaj radikoj, ekz-e *предыстория* (antaŭ-historio) aŭ *подынтегральный* (sub-Integrala). La apero de Ы en latina radiko ŝokas iujn, kaj ili preferas skribi (nenorme) *предъистория*, *подъинтегральный*; per tio ili fakte reinventas la praan formon de la litero Ы, kiu slavone estis la kombino **ЪИ** (tiel en multaj manuskriptoj), kaj kiun la tipografia ŝparemo transformis en la malpli larĝan (kvankam kontraŭsencan) kombinon **Ы**.

Ĉi tiu koncepto, laŭ kiu la aperon de [i] kondiĉas antaŭa konsonanto malmola, estas paradoksa por ruslingvano, ĉar en la rusa skribosistemo la efiko estas inversa: per *ы* oni signas malmolecon de la antaŭa konsonanto. Tial la fonetika kurso iom detale kaj tre konvinke refutas la komunajn objeĵojn kaj demonstras, kial tiu interpreto rezultigas pli belan kaj koheran sistemon; ĝis fine en petito aperas la du kontraŭekzemploj kiuj nin interesas:

Ankoraŭ unu objeĵo: estas la nomo de la litero «и» kaj la nomo de alia litero «ы» («Операция „Ы“»). Oni povas prononci ilin post paŭzo:

- Kiu litero estas tiu?
- И.
- Kaj ĉi tiu?
- Ы.

Do, ambaŭ parolsonoj, [i] kaj [i̯], eblas en unu sama pozicio, post paŭzo; sekve, ne

estas pozicia alternado; sekve ili estas malsamaj fonemoj. Ĉu?

Ankaŭ ci tiu rezonado ne estas valida. La liternomoj apartenas al terminologio, ne al la fonetiko de la komuna lingvo. (...) La liternomoj posedas sian propran, apartan fonetikon.

Simile, estas sonimito ы-ы-ы (plorsono):

– Ы-ы-ы ... Меня наказал отец ...

– Ы-ы-ы ... Положите конец!

(Лебедев-Кумач)

Tamen la interjekcioj ne estas argumento pri fonetiko de komunlingvaj vortoj.

Efektive, la liternomo Ы estas kiel anatomia preparaĵo, izolita el biologia organismo; oni povas ĝin ekzameni laŭ la celoj de esploro, sed tio ne montras ĝian funkciadon en la organismo. Kaj la sonimitoj evidente estas imitaĵoj de alia, nefonema

lingvo.

Kio estas diftongo

Ni jam vidis (p. 22) konfuzon pri la signifoj fonetika kaj skriba (grafika) de la termino *diftongo* en la sekcio pri LR n-ro 70; tamen ankaŭ ene de fonetiko endas distingi inter la signifoj fizika kaj fonologia.

Tiel okazis, ke en la angla lingvo la diftongoj estas, interalie, apartaj parolsonoj kaj fizike, kaj funkcie; sekve de tiu hazardo la anglalingvaj aŭtoroj taksas «veraj» nur tiajn diftongojn, kiuj artikulacie glitas de unu pozicio al alia, ne estas simpla apudmeto de «puraj» parolsonoj; kaj tiun ideon esprimas ankaŭ NPIV:

diftong¹o Λ Vokalo, kiu ŝanĝas unufoje sian tembron dum la eliĝo (ekz. la sono, reprezentata per **i** en la angla

vorto *fine*); analoge (sed evi) en E., kombino de du malsamaj vokoidoj, unusilabe prononcataj, el kiuj unu estas vokalo k la alia konsonanto, ekz. aŭ, eŭ, aj, ej, oj, uj. → digramo, dierezo.

Atentindas ke neanglaj studoj de diftongeco – ekz-e en la franca Vikipedio, *êu* [wa] estas traktebla kiel diftongo – akcentas *guste* la fonologian aspekton de la koncepto. Kaj tia fonologia koncepto nepre pli konvenas al Esperanto, kies fizika bazo fonetika estas multe pli nebula, ol en la nacilingvoj (*eê* ol en la angla).

John Wells skribis en siaj «Lingvistikaj aspektoj de Esperanto»⁸:

⁸ *John Wells*: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. UEA, 1989. P. 19, piednoto 6.

El fonologia vidpunkto ni rigardas la diftongojn *aŭ*, *eŭ*, same kiel *ej*, *aj*, *oj*, *uj*, kiel vokalon plus konsonanto; la konsonanto en tiuj kombinoj estas ja duonvokalo, do artikulacie vokoida (vokal-simila). En diversaj aliaj lingvoj (ekzemple la angla) tia analizo de diftongoj ne estas kontentiga, kaj por tiaj lingvoj ni rigardas la diftongojn fonologie kiel vokalojn.

Mi nur duone konsentas:

1. Mi plene konsentas pri la *j*-serio: mi jam indikis (p. 6), ke kvankam mi mem fizike prononcas [kaĭ] (kaj), [tuĭ] (tuj), [foĭ.no] (fojno) – tamen fonologie ili estas /kaj/, /tuj/, /fojno/.
2. Mi malkonsentas pri la *ŭ*-kombinoj, kiuj *fonologie* estas traktendaj kiel diftongoj (vd

p. 32 pri la AJ-signo en difino de fonemaro); precipe se ekskludi la fonologie nevalidajn kontraŭekzemplojn liternoman kaj interjekciajn (p. 35).

En sia tradicia formo la Fundamento entenas internan malkoheron inter, **unuflanke**, la lingvomaterialo kaj la komenca koncepto, en kiuj ŝ aperis nur kiel kromelemento de la du diftongoj; kaj **aliflanke**, la emo raciigi la lingvon surbaze de la principo «unu latineca litero – unu sono». Nenio estas pli salutinda, ol la emo raciigi la lingvon; la problemo estas, ĉu la teorio estas adekvata al la materialo. Mi opinias, ke bedaŭrinde Zamenhofo provis kombini du malkoherajn principojn:

- la tradicie-latinecan prezenton de diftongoj per duliteraĵoj (aŭ, eŭ); kaj
- apartigon, memstarigon de ties dua *litero* – kio malkoheras kun la fonologia sistemo de

la reala lingvo.

Fakte, similan fiaskon prezentas la lingvoscienco pli impona projekto IFA. Ankaŭ ĝi ambiciis uzi «unu signon por unu parolsono»:

(IPA) does not normally use combinations of letters to represent single sounds, the way English does with ⟨sh⟩, ⟨th⟩ and ⟨ng⟩, or single letters to represent multiple sounds the way ⟨x⟩ represents /ks/ or /gz/ in English. ([La anglalingva Vikipedio](#))

Sed malgraŭ tiu principo la fonetikajn diftongojn IFA prezentas per fonologiaj literkombinoj. La Ŝava alfabeto (vd sube, p. 53) estas ĉi-rilate pli kohera, disponigante apartajn literojn por la diftongoj.

La dilemo

La koherigon eblas atingi dumaniere:

1. ĝeneraligi la uzeblon de *ŭ*, ĝin apartigi en memstaran fonemon similan al *j*;
2. aŭ male, senigi ĝin je ĝia memstareco, rezervante ĝian uzeblon al la du diftongoj.

Por oportunigi referencon al tiuj du ebloj mi nomos la unuan, *emancipa* (*ŭ* iĝas plenrajta kaj aparta fonemo); kaj la duan, *diftonga* (la lingvo konservas diftongojn en sia fonologia sistemo).

Ambaŭ solvoj eblas, la unua konservas la supraĵajn formulojn de la Fundamento, sed ŝanĝas la profundan fonologian strukturon de la lingvo; la dua ŝanĝas la priskribajn formulojn uzitajn en la Fundamento – sed konservas ĝian internan fonologion.

Se Ŭ estus samspeca kiel J (la emancipo de Ŭ)

Tion oni jam faras en la dubindaj transskriboj kiajn oni povas trovi en «Monato» ktp:

„La ĉina gimnastiko Tajĝiĉjŭan“

Watanabe [ŭatanabe]

Jacques Le Puil [ĵak le pŭil]

Poitiers [pŭatjé]

Radziłów [radziŭuf]

Władysław [vŭadisŭaf]

Wesley Clark [ŭezli klark]

Se oni volas serioze trakti Ŭ kiel fenomenon samspecan kiel J, kiel apartan kaj plenrajtan fonemon, pli ol kromelementon de diftongoj – tiam por pli klare kompreni la amplekson de ŝanĝo en la fonologia sistemo konvenus ŝanĝi ĝian literan prezenton: ĝi devus esti la konsonanto W: la fonemo /w/, kun la eblaj realigoj per [w] (la literonomo

«wo», la sonimito «kwaks», «wato» ktp) kaj [ŭ] (ĉiuj normalaj aperoj de «ŭ»: *awgusto, naw, anstataw, awskulti* ktp).

Postuli de ordinara lingvano distingi inter la konsonanto [w] kaj la duonvokalo [ŭ] estas afero malmulte realisma; samkiel en la okazo pri /j/, necesas unuecigo. (Oni ja povus rezervi la literon *ŭ* por la pozicioj postvokalaj; *naŭ* sed *wato*. Tamen tio jam dekomence estus devio de la celata koherigo, kaj tio prezentus problemojn ĉe la vortoj kiel *Okina[wŭ]a*.)

Kompreneble, tio ne estas ia «natura leĝo», sed tio estus pli honesta prezento, kiu pli klare vidigas la konsekvencojn de tia interpreto. Kaj ĝi certe estas tute konforma al la unuecigo de /j/-alofonoj per la litero *j*.

Tio povas iomete ĝeni la okulon en la *aŭ*-kombinoj; sed ne pli ol *krajono* (*crayon*), *Jorko* (*York*).

Analogie kun la fundamenta silabado «Ma-jo» oni tiam diru «na-wa», «anta-wen» ktp.

La supre citita aserto de *J. Wells* veriĝos: *aŭ* kaj *eŭ* fonologie ne plu estos diftongoj, sed liberaj kombinoj de vokalo kaj konsonanto (eĉ se fizike en multaj pozicioj ili restos diftongoj). La fonologia sistemo do ŝanĝiĝos: minus du diftongoj, plus unu konsonanto.

Oni devos zorge distingi inter [v] kaj [w]: [w] ne rajtos funkcii kiel alofono de /v/.

Tiom pli ĝena estos la tradicia transskribo de fremdlingva *W* per *v* (Vaŝingtono) aŭ *u* (Ruando). Tamen kvankam unu fuŝo apenaŭ estas pravigo por aliaj, ni estu justaj: tute simile la tradiciaj esperantigoj ofte misuzas *i* kiam pli ĝusta estus *j*: *Makavelo* anstataŭ la ĝusta *Makjavelo*, tute misa *Tokio* anstataŭ la ĝusta *Tokjo* ktp.

Oni atendu lavangon da nomformoj kiujn la emancipo de [w] igos ne nur eblaj, sed eĉ preferindaj: *Nikaragwo*, *Ekvadoro*, *Okinawo* ... eventuale ankaŭ *wiskio* ktp.

Sekvapaŝe oni devus pripensi la uzon de [w] en la nomoj kiel *Wsewolodo* (situacio tipa, ekzemple, por la ukraina lingvo). Por esti honesta, mi menciigu ke simila problemo sencas ankaŭ pri /j/ – kp la ĉefajn *jsem* (= «mi estas»), *jsou* (= «ili estas») ktp; aliflanke, mi ne konas uzojn de tiaj *j*-kombinoj en nomoj propraj; dum nomoj kun la kombino /w/ + konsonanto estas nemalmultaj.

Koherigo de la tradicia sistemo diftonga

Zamenhofo ne konis la koncepton «fonemo», kvankam intuicie li strebis krei skribosistemon laŭfoneman. Apartigo de la litero *ŭ* tamen rompas tiun principon kaj kreas tenton uzi ĝin pli vaste ol nur

en la kombinoj *aŭ* kaj *eŭ*. En alfabeto laŭfonema devus aperi apartaj literoj por *aŭ* kaj *eŭ*, kaj ne devas aperi aparta *ŭ*. Evidente en ĉi tiu sekcio mi abstrahas pri la netuŝeblo de la Fundamento (kvan-kam ĝia celo estas ĝuste la konservado de la fundamenta sistemo).

La varianto ĉeĥa-hungara

La plej konservema solvo estas deklari la kombinojn *aŭ* kaj *eŭ* du unuopaj literoj; tiel la ĉeĥoj rigardas la kombinon *ch* unuopa litero, kiun ili lokas en sia alfabeto inter *h* kaj *i*:

a á b c č d d' e é ě f g **h ch** i í ...

kaj sekve en la vortaro

Egypt < *echo* < *ejhle*

(evidente, ĉar la ĉeĥa *ch* = *ĥ* – kaj laŭ la sonvaloro, kaj laŭ la loko en la alfabeto – tio estas la sama

ordo kiel en Esperanto: *egipto* < *eĥo* < *ejo*).

Simile en la hungara alfabeto aperas 7 **literoj** *cs*, *gy*, *ly*, *ny*, *sz*, *ty*, *zs* (kaj vortaro listigas vortojn en tiu ordo: *cifera cukor csapadék* ... – kp en Esperanto: *cifero* < *cunamo* < *ĉambro*).

Eĉ pli proksima analogio estus la litero **BI** en la rusa alfabeto, kie la literon **B** modifas la ne plu ekzistanta signo (ne plu litero) **I**.

Tiam la alfabeto de Esperanto iĝus 29-litera:

a **aŭ** b c ĉ d e **eŭ** f g ĝ h ĥ i j ĵ k l m n o p r s
ŝ t **u** v z

Tio ŝajnas enkonduki la duliteraĵojn, kontraŭ kiaj Zamenhofo tiom energie protestis en LR n-ro 70 (p. 18); tamen logike tio estas uzo de iom komplikita diakritilo *ŭ*, simila al la ĉapeloj en *ĉ*, *ĝ*, *ĥ*, *ĵ*, *ŝ*; nemulte gravas, ke *ĝi* aperas en postpozicio, dum la ĉapeloj, en la supera pozicio. Objeto kontraŭ la

literoj *aŭ* kaj *eŭ* estas egalvalora al objêto kontraŭ la supersignoj.

La nomoj de tiuj du literoj povus esti *aŭ* kaj *eŭ*, kiel konvenas al la vokaloj; la nomo por la grafika elemento *ŭ* ne plu estas afero alfabeto (samkiel la nomo de la supersigno de *ŭ* en la Fundamento ne estas difinita).

Ĉe tia difino la aspekto de la normalaj vortoj esperantaj neniel ŝanĝiĝas; ŝanĝiĝas la alfabeto kaj sekve la aranĝo de kelkaj artikoloj en la vortaroj:

atuto < avo < Azio < aŭdi < aŭtuno < babili

Ĉe vortodivido la literoj *aŭ* kaj *eŭ* estas same nedivideblaj, kiel la rusa БИ: *kontraŭ-agi*, neniam *kontra-ŭagi*.

Ankaŭ la du uzojn de *ŭ* en interjekcioj necesos ŝanĝi: *kŭaks* → *kvaks*, *ŭa* → *ua*.

La ĉefa problemo de tiu solvo konsistas en tio, ke restas la tento ekstrakti la diakritilon ŭ en apartan literon kaj reveni al la fundamenta alfabeto de la Ekzercaro – la kaptilo kiun Zamenhofo mem ne sukcesis eviti. (Oni cetere atentu, ke la nuna uzo de la alfabeto devias de tiu en UV: UV traktas supersignojn simile al la lingvoj okcidentaj kaj listigas: *ĉe* < *ced*· < *cedr*· < *ĉef*· ... La nuna leksikografio esperanta sekvas la tradicion orienteŭropan, en kiu c kaj ĉ estas tute apartaj literoj.)

Uzi ligaĵojn

Unikodo entenas literligaĵon a+u: AJ ai (U+A736, U+A737); apriore tio ŝajnas bona anstataŭaĵo por *aŭ* (kaj plej grave, ĝi malebligas demandon pri eventuala uzo de *ŭa* ktp). Tamen la vortoj kun tia ligaĵo aspektas nekutime kaj eĉ malbele:

AJgusto, aitoro, ĉirkaŭ.

Krome, mi ne trovas similan ligaĵon por *eŭ*.

Uzi super- aŭ subsignon

Alia memtrudiĝanta ideo estas uzi la tradician ĉapelon: *â, ê*; aŭ ion pli ekzotan, ekz-e la polajn vostetojn: *ą, ę*:

Â â, Ê ê: Âgusto, âtoro, ĉirkâ, Êropo, lĕtenanto

Ą ą, Ę ę: Ągusto, ątoro, ĉirka, Ęropo, leĥtenanto

Tio estus logika, sed tio tro devias de la internacia idealo latineca. Tiu varianto ŝajnas tute senŝanca.

Nelatina alfabeto

La problemo estas grandparte ŝuldata al la latina alfabeto. La angla *author* estas prononcata (proksimume) «ósa»; la pola *autor* estas prononcata «áŭtor»; nenio komuna en la prononco, sed evidenta komunajĝo en la komenca duliteraĵo.

Kiel la afero status ĉe alibaza alfabeto? Evidente, tia alfabeto egale bone povas priservi ambaŭ solvojn. Estkiel nelatinan alfabeton mi kutime konsideras la Ŝava-Starlingan.

En sia Starlinga formo, la alfabeto bonege realigas la unuan alternativon: ŭ=w, kaj eĉ grafike sugestas la ideon pri tio, ke /j/ kaj /w/ estas aferoj samspecaj (la signobildo de unu estas la signobildo de la alia, turnita je 180°). Alivorte, ĝi prezentas la avantaĝon de unueca skribo *awtoro*, *Waŝingtono* – sed sen la ĝeno pri nekutimeco de *aw* (ĉar nenio estas apriorie kutima en tia skribo).

Tamen ankaŭ la duan alternativon tiu signaro povas bonege realigi. La Starlinga adaptaĵo permutis (kompare kun la anglalingva originalo) la signojn por /j/ (*yea*) kaj /w/ (*woe*); tio efektive pli oportunas en Esperanto. Daŭrigante tiun modifon, oni povas uzi la diftongo-literojn \succ kaj \sphericalangle por *aŭ* kaj *eŭ*.

T.e. kompletigi la vokalan lozanĝon:

a = ʌ ʘ = *e*

u = ʌ ʀ = *o*

per *aŭ* = ʌ kaj ʘ = *eŭ*

Ekzemple,

ʌ: ʘʀʀʀʀ ʌʀʀʀʀ ʘʀʀʀʀ ʌʀʀʀʀ

(*aŭ*: **Aŭ**gusto **aŭ**toro ĉirkaŭ naŭa)

ʘ: ʘʀʀʀʀ ʘʀʀʀʀʀʀʀ ʀʀʀʀʀʀʀ

(*eŭ*: **Eŭ**ropo leŭtenanto neŭtrala)

[w] kiel alofono de /v/

La angla lingvo havas ambaŭ fonemojn, /v/ kaj /w/. Tamen pli ofte lingvo havas ne pli ol unu el ili: la germana kaj rusa posedas nur /v/; la klasika Latino, la ukraina, la ĉina posedas nur /w/. La diftonga alternativo ebligas uzi la sonon [w] kiel

alofonon de /v/; por la rusa orelo tio sonus kiel ukraina akĉento en ruslingva parolo: ĝi kaŭzas nenian problemon en komunikado. Tia permesemo ne plu eblas ĉe la emancipa alternativo, oni devos distingi la du parolsonojn kiel apartajn fonemojn.

Verdire, tiu postulo jam ekzistas ĉe la liternomoj: *ŭo* ≠ *vo*. Nu, mi plu opinias, ke fonologie la liternomo *ŭo* estas kontraŭsistema eraro. Ĝia kroma problemo estas, ke en la rusa prononco la liternomo *o* egale sonas kiel [ŭo] (vd p. 33).

Konkludo

La Fundamento entenas du tavolojn: ĝi prezentas la lingvon Esperanto per tekstoj kaj vortaro (la objekta tavolo); kaj ĝi entenas certan teorion pri tiu lingvo (la meta-tavolo). La objekta tavolo estas la viva korpo de la lingvo; la teorio estas speco de pakaĵo, la vestoj en kiuj Zamenhofo prezentis sian

verkon.

La teorio apartenis al la 19^a jc, kiam la funkcia fonetiko ankoraŭ estis naskiĝanta, kaj ĝia koncepto pri parolsonoj estas iom simplisma (cetere, tia ĝi restas ĉe la ĝenerala publiko ĝis nun). Tio influis la difinon de la alfabeto (kaj interalie, la liternomojn). Estiĝis malkohero inter la propra, interna strukturo de la objekta tavolo, unuflanke; kaj la ne tute adekvata teorio, aliflanke. Resume, la vesto ne estis bone almezurita (tio apenaŭ eblis ĉe la tiama modo).

Tiu malkohero kaŭzis streĉon, kiu restas fonto de provoj ŝanĝi la fonologian sistemon de la lingvo laŭ la teorio. Parte tion kaŭzas la reala bezono esprimi la fremdan sonon [w] per la rimedoj de Esperanto; sed tiaj mankantaj parolsonoj abundegas, sufiĉas indiki la angla-hispanajn [θ] kaj [ð]; tamen neniam tiu manko kaŭzis eĉ malplejan prov-

on modifi la fonologian sistemon de Esperanto. Necesis kombino de la ekstera bezono kaj de la interna fendo, kian prezentas la teoria difekto en la difino de la alfabeto.

Estas du manieroj koherigi la tuton: konsekvence apliki la teorion, emancipante la literon ŭ, kio iom post iom ŝanĝos la objektan lingvon; aŭ koherigi la teorion al la interna strukturo.

Probable venkos la emancipo: ĝi bezonas nenian ŝanĝon en la ideologio, ĉiuj priskribaj vortoj restos la samaj (ŝanĝiĝos la interna strukturo, sed tion malmultaj rimarkos). Alivorte, korekto en la vesto post pli bona almezurado estus afero okulfrapa, kiun rimarkos ĉiuj – kaj kiu nepre kaŭzos protestojn pri la netuŝebla Fundamento. Politike pli facilas apliki ĥirurgion al la korpo, ŝanĝi la vivan organismon adaptante ĝin al la malnova vestaĵo; tion la publiko ne rimarkos.